

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januare 1923: „Heroldo de Esperanto“.
Semajna esperantista ĵurnalo, aperas post 1 decembro 1924 dufoje en la semajno (merkredo kaj sabato).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
I. Olli Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 219
23. 11. 1924

Redakcio:
Cefredaktoro: Teo Jung.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.
Administracio:
Herrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 delaro
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉe malkulmine 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fr. (Ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
ĉe „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Grandmezura rekomenco de nia movado en Francujo.

Esperanto-kunveno en la Universitato de Paris. — Parolado de D-o Privat.

La 7 nov. vespere je 20 h. nekutima vivo regis en la koridoroj de la maljuna Universitato „Sorbonne“. La geologia amfiteatro baldaŭ tute pleniĝis per amasoj da pariaj esperantistoj. Kiam s-o Edmond Privat okupis sian lokon apud la konataj samideanoj s-oj Cart, prez. de nia Akademio, Warnier, prez. de la Parisa Grupo, Rollet de l' Isle kip, eĉ la ŝtuparoj estis plenigitaj de niaj geamikoj: neniu plu povis eniri.

Je 20.³⁰ h. s-o Warnier malfermas la kunvidon, permesitan de la Instrua Ministerio en la Universitato. Li memorigas pri la morfinta prez. de la parisa esperantistoj, s-o Carlo Bourlet. Li memorigas plue pri la unua Esperanta Kongreso en Boulogne s. m. kaj pri nia Majstro. Nun li — uzante alegorian preniton el ĥina rakonto — skizas la efikon de la ministra dekreto de eksministro Bérard. Der bastona bato oni dum momento povas detruu belegan vazon, prilaboritan dum jaro. Tiel okazis al la franca esp. movado en la tempo de la fama dekreto. En malfacilega tempo s-o Rollet de l' Isle turnis sin al instruistoj kaj scienculoj, kiel ni scias, kun bona rezultato. Li citas vortojn de la franca ĉefministro Herriot: ni tenos nian taskon kip. kaj per cito de zamenhofa poemo li certigas ke la francaj esperantistoj ne forgesis sian grandan taskon.

Nun sekvas parolado de s-o Byquem, nome de la S. F. P. E. (Societo Franca por la Propagando Esperanta). Li rakontas pri la faritaj paŝoj rilate al la forigo de la ĉiŝta dekreto. Li vizitis s-on F. Albert, ministron de instruado, kaj s-on Herriot, la ĉefministron, kaj oni faris tre kontentigan promeson. S-oj Epton kaj Correi — du konataj radiotelegrafistoj — interkonsentis pri akcepto de amerikaj signaloj, elsenditaj en Esperanto. La franca Poŝto kaj Telegrafado ne povas forlasi la okazon por partopreni en tiu ĉi gravega eksperimento. Li nun rakontas pri faritaj progresoj. Interalie protekta komitato estas fondita por la S. F. P. E., kiun aliĝis s-o Appel, dekano de la Parisa Universitato, s-o Herriot kaj aliaj ministroj kip.

Post li sekvas s-o Baudet, kiu parolas kiel oficiala delegito de la Parisa Komerca Ĉambro. Li memorigas la lastan sukceson de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj kaj en radio-rondoj. La Komerca Ĉambro jam delonge okupas sin pri Esperanto. Li eĉ deziras la uzadon de Esperanto ne nur en la komerc, sed ankaŭ en la puraj kaj aplikataj sciencoj! La ĉambro voĉdonis 1000.— frankan subvencion por instruado de Esp. por siaj oficistoj. Malgraŭ protesto de kelkaj komercistoj, partianoj de nacilingva korespondado, la ĉambro donas justecon akceptante Esperanto. Li diras la lastan parton de sia parolado en Esperanto por montri ke li deziras helpi nin aktive. (Aplaŭdigo.)

Post la parolado de l' komerca homo sekvas scienculo, s-o Aymonier. Kun granda emocio li parolas ree en Esperanto kvazaŭ post ekzilo en tiu ĉi fortikaĵo de la scienco. La Universitato Sorbonne estis ja hejmo de la pariaj esperantistoj, ĝis unu tagon ministra dekreto fermigis la pordon antaŭ ili. Li faras tre longan kaj sciencon paroladon pri nova metodo de Prof. Mayor pri instruado de nacia lingvo pere de Esperanto. Efektive scio de Esperanto nur povas utili al ni, ekkoni la belecojn de nia lingvo aŭ lerni alian lingvon. La patro de la fama Pascal instruis al nia filo lingvofilozofion antaŭ ol komenci instruadon de la latina lingvo. — Tiu ĉi parolado indas en universitata katedro. Multaj ĉeestantaj studentoj laŭgis tiel.

Fine sekvas parolado de s-o Edmond Privat. En la nomo de la C. K. (Centra Komitato) kaj en la nomo de ĉiuj eksterlandaj samideanoj li salutas la kunvenon. La tutmonda esperantistaro bedaŭris la stagnadon de la movado en Francujo, en lando, kiu dum jardekoj fidele laboradis por nia afero. Li rememoras la tempon, kiam li sidis sur la benkoj de la Sorbonne, kaj kiam li la unuan fojon estis prezentita al la prezidanto de la Akademio, al s-o Cart. Li deziras, ke la franca esp. movado per granda salto reprenu sian antaŭan lokon en la esp. movado tutmonda. Kiam li devis bataladi kontraŭ francaj diplomatoj ĉe la Ligo de Nacioj, li devis diri: estas vi francoj, kiuj instruis al ni Esperanton, vi ne povas ŝanĝi vian vorton. Des pli nun li ĝojas ke la sama ambasadoro, kiu pleje kontraŭbatalis Esperanton, fariĝis iom amika al nia afero. Ankoraŭfoje li rememoras la pasintan tempon, kiam nia Majstro, en societo de famaj scienculoj, tagmanĝis sur la supro de la Turo Eiffel. Tiu ĝloraj tempoj de nia movado devas renaskiĝi. Kun ĝojo li vidas tiujn, kiuj revenas en tiu ĉi „vintira printempo“. Se la francaj samideanoj vidos novajn vizaĝojn inter la pleibonaj esperantistoj, ili ne estas fremduloj. En Wien li ĝojegis vidi multajn junulojn. En la aĝo ili estis, kiam oni elektas inter du vivoceloj: riciĝi aŭ fariĝi laborantoj por noblaj celoj. Kun ĝojo li raportas pri progreso de Esperanto ĉe multaj universitatoj. Studentoj komencas revizii siajn dokumentojn, eĉ verki tezojn pri internacia lingvo. Novaj samideanoj estas jaluzaj je malnovuloj, ĉar tiuj havas la privilegion esti viditaj la Majstron. Ni valorigu tiujn privilegiojn — li deklaras. Li admonas je helpo de junuloj kaj abono al internaciaj gazetoj ĉar „nia movado estas absolute internacia afero“. Nun en kelkaj vortoj s-o Privat skizas la staton de nia movado. La vivo ne nur solvis gramatikajn problemojn, sed ĝi solvis ankaŭ nian organizan problemon. UEA nun liveras dokumentojn kaj direktas internaciajn aferojn, marŝante mano en mano kiel la naciaj societoj. Tamen nur eta parto de la esperantistoj fariĝis ĝis nun membro de UEA, pluj aliĝoj estas tre dezirindaj. Li dankas la francajn esperantistojn pro la grandaj sukcesoj akiritaj en la plej lasta tempo.

Nun venas tre grava parto de la belega parolado. Li anoncas, ke en majo okazos tri Konferencoj en Paris: 1. Komerca Konferenco estos organizata per la Parisa Komerca Ĉambro, 2. Sciencia kaj Teknika Konferenco estos organizita per s-oj Rollet de l' Isle kaj Rousseau, 3. La K. R. kaj la Internacia Komitato de UEA kunvenos en Paris.

S-o E Privat proponas organizi samtempe manifestacion por la plej maljuna kaj grandmerita esperantisto: Generalo Sebert, kiu, kvankam malsana, tamen daŭrigas la grandan verkon de sia vivo, kolekti la dokumentojn de Esperanto.

Fine li invitas ĉiujn je partopreno en nia proksima Kongreso, aranĝota en Genève. Nia ĉiujara kongreso estas Meko vaganta de Esperantujo. La esp. popolo ne volis rezigni je tiu ĉi tradicia festo. La 1. aŭg. okazos la Svisa Nacia Festo samtempe kun la malfermo de nia Kongreso. Fajroj ekbrulis sur sennombraj montoj de la Svisa Respubliko kaj sonoriloj sonos en 22 valoj de 22 kantonoj. „Ni esperantistoj esperas, ke iu tago venos — eble la 15-a de decembro, naskiĝtago de Zamenhof, — kiam en la tuta mondo, en katedraloj kaj preĝejoj eksonos la sonoriloj kaj la homaro komprenos ke ĉiuj homoj havas la samajn korojn kun la samaj sentoj, kaj neniam

plu buĉado de popoloj okazos sur la Tero. Tio ĉi estu la rezultato de via laboro!“

La vortojn de s-o Privat sekvis daŭra aplaŭdo, kaj post dankaj vortoj de s-o Warnier la bele sukcesinta kunveno finiĝis.

Paris, la 8 nov. 1924.

Jozefo Major.

Muziko.

Esperanto-Danc-Kanto.

En la matena numero de 8 nov. de la konata gazeto „Berliner Tageblatt“ troviĝis en la muzika aldono Esperanto-Danc-Kanto (Shimmy) en germana lingvo kaj en esp. traduko de D-o Kliemke.

La eldonejo Rudolf Mosse estas preta permesi al ĉiuj Esperanto-gazetoj, internaciaj kaj naciaj, la senpagan represon de tiu ĉi original-kanto, sub la sekvantaj kondiĉoj: 1. oni citu, ke la eldonejo Rudolf Mosse Berlin donis la permeson por tiu ĉi publikigo, 2. oni sendu post la publikigo unu ekzempleron de ĝi al la eldonejo Rudolf Mosse, Berlin, Jerusalemerstr. 46—49. Ankaŭ la traduko de la esp. teksto en nacilingvon estas permesata.

Pluan ekzempleron de la eventuala publikigo oni bonvolu sendi ankaŭ al la subskribinto.

La eldonejo Rudolf Mosse havas la intencion sendi 100 ekzemplerojn de tiu ĉi Esperanto-kanto al esperantistoj kaj esperantaj gazetoj de eksteraj landoj, kies adresojn ni transdonos al la eldonejo.

Direktoro J. Gluck,
Berlin W. 35, Potsdamerstr. 115, Haus V.

Taylorismo kaj violonistoj.

Ŝajnas esti eble ne kredebla, ke oni povus je la violono studi du poziciojn samtempe kaj duonigi tiamaniere la penigan ekzercon, kaj tamen tio ĉi estas vera.

La violonistoj de la tuta mondo havas grandan sensation. Aŭtoro de tiu ĉi „violona taylorismo“ estas ĉeĥa profesoro Bedřich Vildan de Praha konservatorio. La rezulto de liaj kelkjaraj klopodoj estas ĵus tiu ĉi „renverso“ en la violona instruado. Kiel oni scias, ĉiam du pozicioj postulas je violono parencan fingrometadon, tiel ke la ok pozicioj povas esti reduktitaj je kvar. Prof. Voldan metis tiun ĉi parencan kiel bazon por sia reformita sistemo kaj kreis tiamaniere efektive grandiozan metodon verkon.

La sistemo konsistas el tri partoj: El „Nova metodo de pozicioj“ (komencebla post la traduko de unua pozicio de kia ajn metodo), el „80 kantoj“ kaj „40 studoj“, kio reprezentas grandegan materialon sur kelkaj paĝoj kompare al aliaj metodoj. La kantoj enhavas la plej belejn melodiolojn ĉeĥoslovakajn, jugoslavajn, germanajn kaj anglo-usonajn (kun teksto). Oni ekzemple konsideru, ke ĉiu el la 80 kantoj estas ludebla en du pozicioj (en parenca pozicio preskaŭ sen ekzercedo), kio reprezentas entute 160 kantojn, kiuj devus esti — laŭ la malnovaj sistemoj — ĉiuj presitaj; sed la metodo de Prof. Voldan plenumas sian taskon je duono pli rapide kaj malmultekoste. Same en la 40 studoj la studento lernas du poziciojn samtempe.

Tion tuj bone komprenis la fama konservatorio en Praha kaj enkondukis la verkon en la muzika instituto. La ministerio de instruado kaj ĉeĥa akademio de artoj kaj sciencoj, ekkoninte la gravegan signifon de l' verko, subvencis la tradukon de teksto, kio ebligas fortan disvastigon de la verko ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ trans la maro.

la junaj gemembroj festis solene kun matenestoj kaj manifestacio sian jaran sukceson. Nijaj gesamideanoj klopodis fervore kaj festestis konvinki la gvidantojn de la societo pri la utilo de nia lingvo por la interelna korespondado. Kaj kelkaj, kiuj konsideris ĝis nun nian lingvon kiel ciganan, nun komencis lerni ĝin. La plimulto de la gvidantoj (geinstruistoj — geŝarlistoj) komencis lerni la lingvon en aparta kurso. Estas malfermitaj kursoj por la membroj en I. kaj II. progimnazioj.

Pleven. Pro fervora agado de s-o Iv. Sarafov, progimnazia instruisto, kaj kelkaj junaj helpantoj esp. movado ĉi tie prosperas. Estas malfermitaj 2 kursoj por geurbanoj, en kiuj partoprenas multaj laboristoj, kaj 5 kursoj por gelnarantoj en diversaj lernejoj. La grupo kunvenas ĉiumerkre; en la kunvenoj partoprenas ĉ. 20 membroj por perfektigo en la interparolo. — De 2.—9.11. daŭris nia „verda“ propaganda semajno. Ni komencis ĝin kun bone vizitita matenestoj. La teatro kaj la strato antaŭ la teatro estis ornamitaj per esperantaj kaj diversaciaj standardoj. Estas disdonitaj 3000 flugfolioj kaj sur la muroj en la ĉefa strato surlulitaj propagandaj afiŝoj. Dank' al tio vekigis granda intereso. Estas disvenditaj multaj broŝuroj, lernolibroj, gazetoj. Ĉi tie aperas sub la redaktado de s-o Iv. Sarafov semajna propaganda bulgarlingva gazeto „Verda Stelo“. Baldaŭ ni okazigos esp. ekspozicion.

Cehoslovakio.

Nordbohema Aŭtomobilklubo Reichenberg uzas Esperanton. La nomita klubo eldonis 585-paĝan „Libron por aŭtomobilistoj en Cehoslovakio“. Ĝi enhavas ĉiujn sciindaĵojn por aŭtomobilistoj, kiuj veturas al ekstero de Cehoslovakio. La VII. parto estas speciala „informilo por eksterlandanoj“. Ĝi estas presita en angla, franca kaj itala lingvoj kaj en Esperanto. Esperantistoj-aŭtomobilistoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la libro, bonvolu mendi ĝin aŭ peti informojn pri ĝi ĉe Nordbohema Aŭtomobilkluboj en Reichenberg, Cehoslovakio.

Raporto de Germana Esperanto-Ligo en Cehoslovakio.

Bodenbach. En la kvara klaso de la burĝa lernejo instruas s-o fakinstruisto Störch, ŝtate ekzamenita esp. instruisto, nian lingvon. Böhm.-Kamnitz. S-o instruisto Theml faris propagando-paroladon. Kurso por komencantoj, kiun gvidas s-o J. Werner. Kurso por progresantoj gvidas s-o Hieke. Bürgstein. Propaganda parolado de s-o Ullrich. Kurso en lerneja ĉambro, kiun disponigis senpage la lerneja konsultantaro loka. Graslitz. Fondigis loka grupo de G.E.L. Kurson por komencantoj gvidas ŝtate ekzamenita instr. por Esp. s-o Wölfl. La urbestaro disponigis al la grupo lernejan ĉambron.

Grünlas. Kurso kun 50 partoprenantoj. La komunuma estraro pagas la kofizojn. Kursigvidanto s-o instr. Haiek, Janessen. En la kvara klaso de la popola lernejo instruas Esperanton la ŝtate ekzamenita instruisto por Esp. s-o Haiek el Meierhöfen.

Kraitzau. La nova fondita grupo „Verda stelo“ kunvenas ĉiusemajne en hotelo Kudlich. Ekzercaj kunvenoj por progresantoj. Kriesdorf. Propaganda parolado de s-o Ullrich. Kurso gvidas s-o Jäckel. Langenau. Grupestro Bräuer aranĝis lokan premian skribadon por la grupanoj kaj kursanoj.

Pihanken. Kurso por komencantoj. S-o Gutmann aperigas instruad-angulojn en „Teplitz-Schönauer Anzeiger“. La socialistaj gazetoj „Freiheit“ aperigas ĉiusemajne esp. angulojn, kiuj raportas pri la eksterlanda esp. movado.

Pilsen. Ŝtate ekzamenita instruisto f-ino Vladislavljevics gvidas kursojn por komencantoj en la Germana Burĝa Lernejo por knaboj. „Pilsner Tagblatt“ publikigas kursojn por Esp. kiujn verkas s-o Schmeiger. Reichenberg. Kurso por komencantoj gvidas s-o instr. Hübnler, ŝtate ekzamenita esp. instruisto. La 31. 10. amika kunveno, kiun ĉeestis gastoj el Grottau, Gablonz kaj tri hindoj.

Rochlitz. S-o Schier gvidas kursojn por komencantoj. Warnsdorf. Propaganda parolado de s-o instr. Theml. Kurso por komencantoj.

Zwickau. Propaganda parolado de s-o instr. Taubmann. Esp. ekspozicio. Kurso por komencantoj gvidas s-o instr. Taubmann, ŝtate ekzamenita esp. instruisto.

Bratislava (Pozsony, Pressburg). Post sukcesplena propagando, komence de oktobro malfermis la loka „Esp. Tablogirlando“ publikajn kursojn, kiuj estas bone vizitataj. Kursigvidantoj: s-o Kesik, f-ino Bircsó kaj s-o Kiss. Perfektigajn kursojn gvidas s-o Prof. Wanitsch kaj s-o Kláppa. Inter la laboristoj propagandas s-o Maximilian. Li ankaŭ gvidas kursojn por ili. Sub gvidado de s-o Kesik okazos la 14. 12. Zamenhof-memorstato. Detala programo sekvas.

Francujo.

Lyon. La 5. 11. loka sekcio de Respublikana Komitato de Komercio, Industrio kaj Terkulturo organizis paroladon de s-o T. G. Oudet pri „Esp. en la internacia komercio“. La paroladon ĉeestis kelkaj membroj de la komerca ĉambro kaj multaj komercistoj kaj industriistoj. Gazetoj favore raportis.

Germanujo.

Saksa Esp. Ligo.

La Germ. Esp. Kongreso en Plauen estis komisiinta Preparan Komitato, prezidatan de s-o urba jurkonsilisto Feder en Chemnij, por prepari la referonon de ligo de saksaj esperantistoj. La komitato tuj eklaboris kaj finis siajn laborojn per kunveno en „Meisterreck“ en Chemnij la 30. 10. 1924.

La 1. 11. estis aranĝita salutespero, la fondokunveno okazis la 2. 11., aĝm. je 11 h. en „Meisterreck“. Partoprenis, krom chemnijaj gesamideanoj, la laboristojn de GEA, estis pli ol 50 saksaj lokoj; i. a. ĉeestis la prez. de GEA, s-o D-o Steche, la direktoro de Esp. Instituto por la Germ. Respubliko, Prof. Dietterle, kaj la estro de Dresdena Esperantistaro s-o Karsch.

La refero estis unuanime efektivigata post parolado de s-o Feder pri la celoj de SEL (kollekti sur limita teritorio de la germana gepatra lando ĉiujn esperantistojn al komuna laboro por pli perfektigo de la propagando kaj por forlignado de la esp. vivo), kaj post vigila diskuto, en kiu partoprenis s-oj Pehold, Köb (de librovendista vidpunkto), Mündel (de la vidpunkto de la laborista asocio), Steche, Dietterle k. a. La esp. laboristoj promesas plenan moralan helpon al la referonda ligo, sed ili ne povas mem aligi la ligon. D-o Steche esprimis unue la zorgon, ke la ligo povus malhelpi al ŝi almenaŭ malfaciligi la laborojn de GEA, sed poste li forlasis siajn dubojn, precipe post kiam Prof. Dietterle estis almontrinta, ke en malgranda asocio por aliĝo al GEA, la lab. asocio kaj UEA, ĉeestante la ligo estos libera unuigo, servanta al GEA, sed ne dependa de ĝi.

La organizo de la ligo devos esti plejble simpla kaj la administrado plejble malmultekosta. Kiel unuan prezidanton oni elektis s-on Feder kaj donis al li la rajton kompletigi la estraron. Speciala ligo organo ne estas kreota, la membroj ricevos laŭbezone apartajn sciigojn.

S-o Naumann (estro de la gazetara servo de GEA) donis valorajn informojn el sia sperto kaj petis, ke oni provizu lokajn gazonojn per esp. artikoloj kaj sendu al li gazet-eltraŭĉeojn pri Esp.

Du delegitoj transdonis invitiojn: Ziittau invitas al printempa Ansbereg al vintrosporta kunveno en januaro. Leginte la saluletojn kaj telegramojn, la prezidanto fermis la harmonian kunsidon kun kora: „Ĝis revido la proksiman jaron en Chemnij!“

Post la tagmango saksaj esp. instruistoj preparolis tute libere kelkajn aferojn, poste la ankoraŭ restintoj priirakis statistikan, organizaĵ kaj varbolfian demandojn.

S-o Michaelis invitis al Magdeburg por la Germ. Esp. Kongreso en venonta jaro. S-o Karsch propagandis por UEA.


Eble la kunveno de Chemnij instruas: Dise marŝi, unuigiĝi venki! (Laŭ raportoj de E. Kl.)

Roßwein. De post kelkaj monatoj aperis en „Roßweiner Tageblatt“ ĉiusemata Esperanto-angulo. Multaj legantoj interesiĝis pri Esperanto. Pro tio s-o Schröder el Marbach dufoje preparolis nian movadon kun la sukceso, ke grupo fondigis, kaj la 5. 11. komenciĝis kurso kun 28 p. Por pravi al la gelnarantoj la disvastigado de Esperanto, mi petas, sendi ĉiusemajne esperantojn. — Joh. Weichelt, kursigvidanto, Marbach b. Roßwein.

Saar-Teritorio.

Esperanto-Ligo Saar-Teritorio. La vintre agado komenciĝis. La 5. 10. granda varbunkunveno en Wiebelskirchen, paroladis s-o Omior. Kronio esp. kantoj kun liuto de s-o Kolon kaj kantoj de infanoj.

La 26. 10. en Orlweiler generale kunveno de la Ligo. La prez. s-o Krämer kondigis la fondigon de tri novaj grupoj: St. Ingerb. Wiebelskirchen kaj Niederlinweiler. La grupestroj raportis pri novaj kursoj en St. Ingerb., Neunkirchen, Wiebelskirchen, Niederlinweiler, Friedrichshal kaj Völklingen. La sekretario informis pri fonda de ekzamena kaj gazeta komisionoj. Sekvis amuzaj partoj, en kiuj prezentigis teatraĵoj, kantoj kun liuto kaj deklamaĵoj. La tre bone vizitita kunveno finiĝis per dancado. Sch.



Subtera foirdomo Leipzig. — Interno de la halo post la finkonstruo.

Hispanujo.

Unua kongreso de Federacio Esp. Levantina okazis en Chester la 19.—20. 10. La eksterurbaj gesamideanoj estis akceptataj ĉe la stacidomo de multaj ĉestestanoj, de la urbestaro kaj de la urbestro s-o Vicente Navarro. Post oficiala salutparolado en la urbdomo kaj post prezentado de la ĉefaj esperantistoj al la aŭtoritatoj, oni kunvenis por labora kunsido je 11 h. Oni priirakis ĉefe organizajn kaj kofizajn demandojn, UEA k. a. Kiel lokon por la venontajara kongreso oni elektis Liria, belan urbeton en la provinco de Valencia. Tagmeze la urbestro regalis la kongresanojn per bukedo servata de belaj esperantistinoj. Post la bukedo okazis fotografado. Je 5 h. komenciĝis solena publika kunsido prezidata de la urbestro en teatro de societo „La Liceo“, kiu estis tre harmonia kaj impresita. Prezidanto de l' kongreso estis s-o Pinó, prez. de la loka grupo en Chester estas s-o Mánez. Kun krioj: „Vivu Esperanto! Vivu Chester! Vivu Liria!“ la kongresanoj fine adiaĵis reciproke.

Nederland.

Dordrecht. S-o Roubos gvidas kursojn kun 18 p. merkrede. Konversacia vespero okazas ĉiuvendrede en „Oranje Hotel“.

Groningen. La 22. 10. komenciĝis du kursojn kun 42 gelnarantojn, gvidataj de s-o P. van Dokkm, Veendam.

Veendam. Antaŭ nelonge du vesperaj kursoj malfirmigis kun kontentiga partopreno — entute 25 kursanoj — sub la gvidado de s-o P. van Dokkm, estro de la Veendam lernejuigo.

Latvio.

Liepaja. Post klopodoj de delegito de UEA s-o Eduardo Jaunvalks estas malfermita kurso en „Tautas Augstskola“ (popola aĵlernejo) kun 45 partoprenantoj. Instruas s-o Jaunvalks.

Post penoj de agema samideano s-o Jakob Labrāts malfirmigis dua kurso kun 20 partoprenantoj en loka kinostudejo. Instruas s-o Jaunvalks.

En loka gazetaro aperis multaj pri- kaj puresperantaj artikoloj.

Rusujo.

Serpuhov. Jam depos 16 jaroj s-ano A. Pafomov agadas ĉi tie por Esperanto. En la daŭro de tiu tempo estas instruitaj pli ol 1500 personoj, el kiuj ĉ. 50 farigis bonaj esperantistoj, kiuj nun estas dissemitaj tra tuta Ruslando. La esp. laboro ĉi tie estis agrabla, ĉar la estraro estis suspektemaj, kaj unufoje oni eĉ arestis kaj malliberigis samideanojn. Nuntempe ni havas 72 gelnarantojn, nia biblioteko havas 187 volumojn.

Esperanto en Lernejo.

Cehoslovakio.

Bodenbach. S-o fakinstruisto Störch instruas Esperanton en la kvara klaso de Burĝa Lernejo.

Germanujo.

Bochum. Ĉi tie fondiĝis la 11. nov. esperanta fako de la Instruistaro apogante sin al la loka grupo „Progreso“. La ekzerckunvenoj okazas lunde je 8.30 h. en „Bucher Hof“.

En Bochum-Weitmar komencis du paralelkursoj por geinstruistoj kun entute 28 p. Gv. rektor Dobke.

Roßwein. La 8. 11. s-o Scheibler-Würgwitz, estro de Saksaj Instruistaro Esperanta, parolis antaŭ la membroj de la distrikta instruista unuigo. Roßwein pri „Esperanto kaj la popollernejo“. Li ankaŭ faris malgrandan ekspozicion kaj okazigis interparoladon inter la ĉeestantaj esp. kolegoj. La sukceso estis bona. La lerneja konsilio de la distrikto Döbeln mem rekomendis al la geinstruistoj,

urbaj kaj kamparaj, lerni kaj eble ankaŭ instrui Esperanton. Nun ekzistas instruista kurso kun 10 p. Sinjoro Schröder-Marbach estas kursigvidanto.

J. Weichelt, Marbach.

Bulgarujo.

Pleven. Pri nia movado interesiĝas precipe la gelnarantoj. En la knaba gimnazio estas malfremtitaj du kursoj kun 40 p., en la vinberkultura lernejo 1 kurso kun 20 p. Baldaŭ estas malfremtota kurso en la knabina gimnazio. S-o Iv. Sarafov, prez. de la grupo, malfremtis kursojn en l-a progimnazio kun 20 p. sed nun la entuziasmo estas granda kaj la nombro de la gekursanoj pligrandiĝas. Baldaŭ estas malfremtota nova kurso en Instruista Instituto, kiu preparas geinstruistojn por la progimnazioj (superaĵ klasoj en unuagrada lernejo).

Esperanto ĉe Tutmonda Ŝpar-Kongreso.

Dum la Tutmonda Ŝpar-Kongreso, kiu okazis la pasintan semajnon en Milano, kaj kies aliĝintoj estis pli ol 500 reprezentantoj el la tuta mondo, la franca delegito s-o Prof. Boucou el Anney salutis la kongresanaron en la nomo de la francaj elmigrantoj kaj parolis, ĉiam en Esperanto, pri la uzado de internaciaj ŝparlibretoj por la elmigrantoj tutmonde.

Prof. Ravizza, sekretario, bone tradukis, kaj la ĉeestantoj miris pro la neatendita esp. parolado.

La prezidanto, Lia Moŝto Eksministro por agrikulturaj aferoj, De Capitano D' Arzago gratulis s-on Prof. Boucou, bondezirante la uzadon de Esperanto en la venontaj kongresoj de l' ŝparo.

(Estas bedaŭrinda afero, ke nur unu, kaj eĉ franco, parolis esperante: la finnaj, la cehoslovakaj, la svedaj, la hungaraj kip. delegitoj parolis ĉiuj france, krom la angloj kiuj nature parolis a-ĝle.)

Kial UEA ne volis sin okupi pri tiu gravega afero, kaj ne volis atenciĝi pere de „Esperanto“ aŭ de cirkuleroj al delegitoj en ĉiuj urboj la tutmondan esperantistaron? Anstataŭ organizati U. Kongresojn de jam konvinkitaj esperantistoj, estas pli bone egi por esperantigi la U. Kongresojn de neesperantistoj. Rim. de raportinto.)

Radio.

Reproso en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Radio-Kurso pri Esperanto de Vox-Haus Berlin.

Post longaj penadoj nun ankaŭ la Berlina Sendostacio Vox-Haus aranĝos Esperanto-instruadon. Sabaton, la 22. novembro, post-fagmeze je 4.00—4.30 h. sur ondo 505 s-o Direktoro J. Glück, Berlin, faros paroladon pri Esperanto kaj ĉiusemata je la sama tempo instruos Esperanton per Radio. Tiu ĉi kurso estas de speciala signifo pro tio, ke 150 000 personoj estas abonantoj kaj proksimume 200 000 partoprenantoj, kiuj ne estas abonantoj, aŭskultos regule tiun instruadon.

En-kaj eksterlandaj samideanoj, kiuj aŭdos tiujn ĉi paroladojn kaj poste la instruadon, estas kore petataj tuj sciigi tion al s-o Dir. J. Glück, Berlin W. 35, Potsdamerstr. 113, Haus V.

Al ĉiu intereso!

La estro de unu el ĉi-landaj sendanraj stacioj donis al prezidanto de Philadelphia Esperanto Societo skribaĵon tekstantan:

„Plaços al ni enhavi hispanan, francan kip. kaj Esperantan anoncon, dum niaj internaciaj provoj estos farataj eble ĉirkaŭ januaro aŭ februaro de 1925.“

PES deziras, ke ĉiu samideano en la tuta mondo aŭskultu al la programo kaj respondu al la petoj, ke la aŭskultantoj skribu al la dissendejo por montri, ke Esperanto estas ŝata de ĉiulandano. Se alvenos sufiĉe multaj respondoj, eble aliaj najbaraj dissendejoj faros la samon. Eventuale la anoncoj estos dirataj unue en Esperanto, poste alilivege por la neesperantistoj en la aŭdantoj.

La estro de PES ĉi-pere anoncas, ke li sendos al ĉiu, kiu tion postulas, anoncon, kondiĉe ke oni enfernu tri cendojn (usonajn) por afanko. Se la societo aŭ individuo dezirus pli ol unu kopion, oni pagus sedek kvin cendojn por ĉefi anoncoj. Respondekuponoj estas akceptataj du po kvin cendoj. Poŝtmandatoj pagebjal al „Esperanto Societo“, Haddonfield, N. J. Usono.

Ni petas respondi tuj por faciligi niajn klopodojn Esp. Soc. Haddonfield N. J. (Usono). Edw. W. Pharo Jr., prez.

Bibliografio.

Gazetoj.

Belga Esperantisto, Antwerpen, jul.—aŭg.
 Germana Esperantisto, Berlin, nov.
 Holanda Esperantisto, 8. 11.
 Movado, Helsinki, okt.
 Pola Esperantisto, Warszawa, jun.—jul.
 Sennaciulo, Paris kaj Leipzig, 13. 11.
 Svenska Arbetar-Esperantistoj, nov.

Gazetaro.

L' Index des Industries du Cuir, Paris, nov. Kun esp. indeskso.
 Reichenberger Zeitung, 21. 9., 24. 9., 2. 10., 5. 10., 11. 10., 5. 11., 9. 11. Pli-malpli longaj artikoloj pri Esp.
 Freigeist, Reichenberg, Csl. 5. 10., 7. 10., 28. 10., 7. 11.
 Esp. anguloj kun artikoloj el ET aŭ Prolet. Esp. Servo. Freiheit, Teplitz Schönau, Csl., 25. 10. „Cu herojo“, germ. kaj esp., el ET.
 Sozialdemokrat, Praha, 10. 10., 18. 10., 23. 10. Div artikoloj pri Esp.

Alvoko.

Esp. ekspozicio Pleven.

Por vekigi interon al nia movado precipe inter la instruistaro kaj gelnarantaro dum februaro, okaze de la distrikta geinstruista konferenco pedagogia, ni aranĝos esperantan ekspozicion. Ni tulkore petas sendi al ni diversajn libretojn, gazetojn, ĵurnalojn, il, PK, PM. Sendu ĉion al adreso: Esp. grupo „Esperanto“ aŭ al prez. de la grupo Iv. Sarafov, instruisto en l-a progimnazio, Pleven, Bulgarujo.

Wiena Esperanto Centrojo.

Alfred Siebenschin

loganta nuntempe: Wien IX, Liechtensteinstr. 157, II/29 aŭ Wien IX, Heiligenstädterstr. 10; ĉe s-ino Anna Schober, Pluaj adresoj uzataj de Siebenschin: „Esperanto“, Wien 66, Postfach 68, „Esperanto“, Laborista Grupo, Wien 66.

La supre citita Alfred Siebenschin jam de antaŭmilita tempo kompromitis la Esperanto-movadon. Li estis ekzemple el tri Esperanto-societoj de Wien ekigita sisteme. En la jaro 1921 Siebenschin sendis amase al gesamideanoj en landoj kun bona valuto almozleterojn petante pri alsendo de 50 ĉeĥoslovakaj kronoj, 50 aŭvedaj kronoj, 40 svisaj frankoj ktp. Ni havas leterojn de gesamideanoj, laŭ kiuj li solene prometiis iom-post-ioman repagon, sed ne faris tion kaj ne atestis la ricevon de la mono nek dankis pro ĝi. Siebenschin ankaŭ nuntempe daŭrigas agi, kaj ni kolektas pruvmaĵojn kontraŭ li, kia estas montrata al la rondoj, en kiuj li nuntempe fantomumas, por malebligi al li pluan subfosadon kaj kompromiton de nia afero. La gesamideanoj en la tuta mondo, kiuj estas multmilitigitaj de Siebenschin aŭ kiuj posedas pruvmaĵojn kontraŭ li, ekzemple almozleterojn de li, postklopcon pri forsendita al Siebenschin mono, gazetojn en kiuj aperis almozanoncoj de li ktp., bonvolu sendi tiujn pruvmaĵojn al la adreso: Alfred Klein, II, Pazmanitengasse 10/21, Wien, Aŭstrio.

Ankaŭ, kie tiuj pruvmaĵoj ne plu ekzistas, oni almenaŭ sendu detalan esperantlingvan raporton pri la malbonaj kun Siebenschin faritaj spertoj. La gesamideanoj estu konvinkitaj, ke ni ne agas laŭ persona vidpunkto, sed ni nur volas malebligi, ke nia afero plue suferu.

Dankon antaŭe por afabla klopdo kaj samideanan saluton de

Esperanto-Delegitaro de Wien

Emil Schade, sekretario.

Walter Smital, afergvidinto.

	Mk.
Ruslando 1914 bonfaro (milito) 4 ekz.	0,55
„ 1917 glavo kaj ĉeno 2	0,12
„ 1923 kapoj 5	1,20
„ 1924 aerpoŝto 4	1,80
Ukrainio 1925 malsato 4	1,80
Grand-Britujo 1924 ekspozicio 2	0,42
Belgujo 1919 ŝtalkasko 1-50 c. 10	2,70
„ 1910 bonfaro 8	0,60
„ 1920 olimpaj ludoj (surpreso) 5 ekz.	0,20
Svislando 1900 jubileo 5 ekz.	0,65
„ 1914/18 3.— 5.— 5.— 10.— fk.	1,65
„ 1919 paco 3 ekz.	0,55
„ 1921 provizoraĵoj 6	0,50
Ĉeĥoslovakio 1919/22 legiano 6	0,45
„ 1920 aerpoŝto 5	0,90
„ 1920 ruĝa kruco 5	0,75
Bulgarujo 1902 Schipka 5	0,95
Hungarujo 1925 Petŝi 5	1,10
Rumanujo 1925 kronado 6	1,55
Germanujo 1919/23 aerpoŝto 19	0,80
„ 1923 Rejn- kaj Ruhr-helpe 0,40	
„ 1925 Warburg kaj Katedralo 0,10	
„ 1924 Stephan 10, 20, 40, 80 pf. (stampitaj) 0,50	
„ 1924 bonfaro 4 ekz.	4.—
„ 1924 aerpoŝto 5-300 pf. 7 ekz. 8.—	
Germana Sud-Okcident-Afriko 5-80 pf. 9	1,60
Virtembergo 1916 cervo kaj urboj 16	0,90

Prezoj en germana marko
1 marko = 1,25 svis. fk.

Eksterlandaj bankbiletoj estas kalkulitaj laŭ taga kurzo. Sendkostoj aparte. Bonvolu postuli mian detalan prezaron!

**Briefmarkenhandlung
Schultze - Köslin
Germanujo Postschliessfach.**

Tra la mondo.

Maneskribata internacia rondiranta ĵurnalo. La ĵurnalo estas plej efika rimedo por subteni konsiantan intereson al la lingvo en komencantoj, gekursanoj, gejunuloj, infanoj. Ankaŭ ĝi estas rekomendata al ĉiu samideano, kiu deziras perfektigi en Esperanto, ankaŭ al skribemuloj, verkistoj, tradukistoj, kiuj ne havas eblon ial vidi siajn artikolojn presitaj. — En ĉiu kajo partoprenas dek samideanoj de malsamaj landoj. — En ĉiu kajo estas problemoj, konkursoj kaj aliaj interesindaĵoj kun multaj valoraj premioj. — Jam en multaj landoj la ĵurnalo havas grandan sukceson! — Partoprenantoj de la ĵurnalo enskribas en kajojn ricevitajn siajn artikolojn originalajn aŭ tradukitajn, aŭ versajojn laŭ sia plaĉo kaj elekto, faras notojn kaj korektojn en artikoloj jam enskribitaj kaj ĉet. — Abonjaro komenciĝas de kia ajn dato. — Jara kotizaĵo estas 1 amerika dolaro. — Gekursanoj, anoj de esp. grupoj, familianoj kaj ĉet., aliĝante ope — pagas 1 amer. dolaron + 0,20 de dolaro por ĉiu plua partoprenanto. — La kotizaĵoj oni sendu en leteroj rekomenditaj (en amer. dolaroj aŭ en bankbiletoj de sia lando laŭ taga kurzo de amer. dolaro) al la administranto de la ĵurnalo: S-o F. Krämer, Lehrer, Annaberg, Erzgeb., Germanujo. — Pluaj detaloj estas riceveblaj de la administranto kontraŭ unu respondkuponon. — Detala regularo por partoprenantoj estas en ĉiu kajo de la ĵurnalo.

Artaj oleo-pentraĵoj.

Kopioj de klasikaj kaj modernaj famaj majstroj, similegaj al la originaloj.

Specimenaentraĵo sur ligna kadro estas sendata kontraŭ antaŭpago de 1.— dolaro aŭ egalvaloro.

E. Heyn, Dresden-Loschwitz, Germ.
Esperanto-fako, Ludwig-Richterstr. 6.



LEIPZIG-A FOIRO
La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo. Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj por Tekniko kaj Konstrufako

Printempa Foiro 1925 de la 1a ĝis 7a de marto.
Teknika Foiro de la 1a ĝis 11a de marto

Aŭtuna Foiro 1925 de la 30a de aŭgusto ĝis 5a de septembro.
Teknika Foiro de la 30a de aŭgusto ĝis 9a de septembro.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG




Abono al Internacia Medicina Revuo

Oficiala Organo de T. E. K. A.
Ĉefredaktoro: D-o Karl Mezel.

★
VI. Terézkörút 6, Budapest, Hungarujo.

— Petu specimenon! —



Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj presoj, kostas po du presoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkoto, ĝuas pro propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., preĝra prezo por postabonantoj 1,25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

ADRESANĜO. S-o A. P. Drozdov en Ĉerepovec transloĝiĝis kaj nova adreso estas: Ĉerepovec (Rusl.), Zinovjevstr. 39, laŭ kiu adreso la estimataj gekorespondantoj nun estas petataj skribi. [1]

PETO Gesamideanoj ĉiulandaj! Redaktoroj! Helpe al nia pagopando! Sendu almenaŭ po unu PK ilustritan kaj gazetajn servojn en la aranĝata ekspozicio de nia grupo dum marto por pruvi, ke Esperanto estas disvastigita. Koregajn antaŭdonojn! Adreso: Esperantista grupo „Sukceso“, urbo Vraca, Bulgario. [5]

SIAN ESP. BIBLIOTEKON (tre maloftaj libroj kaj gazetoj grandpartiaj bnditaj) vendas kaj nomaron nur al serioza, aĉetemuloj sendas: Iv. Křestianoff, en Pirdop, apud Sofia, Bulgario. [4]

GRAFOLOGIO. Klaraj juĝoj de la karaktero estas projektataj esperantlingve de P. Beier, Ottendorf ĉe Greiffenberg (Schl.), Germanujo. Prezo 1 mk. aŭ egalvaloro. [2]

RADIO. Mi deziras bildojn (PK aŭ aliajn) prezentantaj rondradio- (Broadcasting kaj Rundfunk) ŝtaciojn eksterne aŭ interne. Iliajn antenojn, aparatojn ktp. kaj rekomencos laŭdire per PI, PK, PM aŭ pago. Speciale interesaj estus bildoj de la bone atdeblaj sendejoj en Aberdeen, Birmingham, London, Münster, Frankfurt a. M., München, Nürnberg, Berlin-Voxhus, Königswusterhausen, Königsberg, Leipzig, Stockholm kaj ankaŭ aliaj. T. A. Lindberg, Urtjala (Finlando). [1]

„ESPERANTO PRAKTIKO“, julio 1921 ĝis dec. 1922, kunbndita por 50.— kĉ; „Marto“, jaroj 1921 kaj 1922, kunbndita por 50.— kĉ; 27 lernolibroj Aumayr eldonitaj 1922 de l' Aŭstria Lab. Ligo Esperantista por 80 kĉ. aŭ egalvalora mono. F-ino Filomena Lustinej, Wilsdorf ap. Bodenbach a. E., Ĉeĥoslovakio. [1]

AL DISIRINTA L. K. K. EN WIEN. En Wien mi ne ricevis monsumon de 25 mk. destinitan por mi. La poŝto-konstata alvenon de la mono en Wien. Letero, kiun mi skribis al Wien, revenis. L. K. K. ne plu ekzistas. Al kiu mi turnu min, por ricevi mian monon? Albert Weber, Altwasser 2, Hochwaldstr. 6, Silezio, Germanujo. [2]

POŝTKARTVESPERO. Ĉiulandaj samideanoj estas petataj sendi frue il. PK por nia propaganda vespero la 11 dec. Ni nepre rekomencos sammaniere, se la sendinto deziras. Adreso: Cheltenham Esperanto Societo, ĉe s-o W. M. Appleby, Clarence Street, Cheltenham, Anglujo. [1]

POLLANDA KOMERCA ARGENTENO Warszawa, Krak-Predm. 10, Adolfo Oberrotman, deziras eniri seriozajn komercilatojn kun gravaj firmaoj, kiuj deziras vendi aŭ esti reprezentataj en Pollando, aŭ eventuale malfermi tie stokojn por povi pograde vendi la komercaĵojn. [1]

REKOMPENCO DE 5 SILINGOJ (aŭ 5 markoj) por unu ekzemplar de „Esperanto Triumfonta“ (n-o 3). Urpege bezonata. Skribu al Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, Londono, W. C. 1. [1]

KOOPERATIVULOJ. Helpe gravan propagandan celon! Se vi ankoraŭ ne skribis, tuj sendu laŭ PK al s-o W. R. Wood, 2, Upton Vale Terrace, Torquay, Anglujo, por la Kooperativa Letervespero de la Torquay grupo. Respondoj al ĉiu. Klopdo vi. [1]

ESTIMATAJ PROPAGANDISTOJ! Ĉu vi volas ricevi rusajn esp. gazetojn: Buletano de Sovetlanda Esp. Unuiĝo, kaj „Esperantisto de Oriente“? Sendu interŝanĝe esp. gazetojn de viaj landoj. Ni devas aranĝi ekspoziciojn ĉe multaj esp. societoj en Ruslando. — Sovetlanda Esperanto Servo, Ruslando, Moskva, poŝtadreso n-o 714. [1]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Al la tutmonda samideanaro! Por miaj 40 kursoj mi serĉas korespondantojn en ago 18-30 da jaroj. Ĉiu ricevos certe respondojn, kiu deziras korespondadi daŭre per il. PK kaj L. Oni skribu al Rud Charbulak, del. de UEA, Hranice, Moravio, Ĉeĥoslovakio. [2]

Du fraŭlinoj kaj du sinjoroj el Finnlando deziras korespondi per il. PK Adreso: Fredrikink. 55-A-1, Helsinki, Finnlando. Unua f-lino, dua f-lino; unua s-o, dua s-o. [2]

Du junuloj: Wilhelm Ueberlein, 21 jara, kaj Alfred Ueberlein, 17 jara, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo. Ni ĉiam respondas. Felhammer-Süd, Kurze Str. 3, Schlesien, Germanujo. [3]

Deziras interŝanĝi PM kun samideanoj el tuta mondo. Serioza interŝanĝado. Danove Giuseppe. - Via Casasaregiz 28-6, Genova, Italujo. [2]

Ĉar mi ricevis tro multe da proponoj pri interŝanĝo de PM, mi devas maldiligigi, ĝis necerta tempo, la interŝanĝon de PM kun novaj samideanoj. Sed PK bli., monerojn, fotografajojn mi interŝanĝos. Mi certe respondos. Kiu ne estas kontenta, iuj tuj skribu tion al mi. Melchior Dora, (Laios), bei Scar, Alzettestr. 49, Esch s. Alzette, Luksemburgo. [1]

Multaj membroj de nia Asocio skribis al anoncantoj sed neniam ricevis respondojn. Tial de la Esperanto Asocio Selb estas aranĝotaj korespondaj vesperoj la 30 nov. kaj 15 dec. por ricevi adresojn de veraj, seriozaj gesamideanoj. Respondoj garantias la societestro. Adreso: Hans Bayreuther, urba supra sekretario, Burgstr. 11, Seib, Bavarujo. [2]

S-o Richardo Hartmann, Hermsdorf Bez. Breslau, Bergstr. n-o 6, Germanujo, loĝas nun ĉe s-o Mangiwirt, Griessen 28, Amt Waldshut in Baden, Germanujo, kaj deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK kaj L, il. gazetojn, esperantajjn por instruado, kolektas ankaŭ PM, sed purajn kaj nedifektajn kaj fotografajojn. Ĉiam respondos! Saluton al ĉiuj miaj korespondantoj kaj al Esp. Grupo „Konkordo“ en Hermsdorf, Bez. Breslau. Saluton kaj dankon al ĉiuj gesamideanoj de Germanujo, Tirolo (Aŭstrio) kaj Svisujo pro via bonega subteno dum mia migrado tra viaj landoj. [2]

Studento de Elektroteknika Instituto k-do D. Gavrilĉik, Rusujo, Moskva, pokrecka, dom 4. kv. 26, deziras korespondi pri elektrotekniko kaj sporto. Respondoj garantiata. [1]

Mi deziras interŝanĝi PM kun seriozaj kolektantoj de la tuta mondo (100-500) po Michel 1924 aŭ Gold-Michel Unue ne sendas. K-do Vasiliev V., Volsk, Rusujo. [1]

La anoj de Lab. Esp. Klubo London deziras korespondi kun alilanduloj pri seriozaj temoj, ekonomio, historio ktp. kaj por esti informataj pri la esp. movado. Skribu al D. Flower, 67 Hedsor Buildings, Bethnal Green, London, Anglujo. [1]

S-o Masa Mizutani, Misono 5, Kamata P. O. Tokio, Japanujo, deziras interŝanĝi PM. kaj PK pri nudo aŭ duon-nudo en arto, kun samideanoj. Certe respondos. [1]

S-o József Szulman, Sieradz (Polujo) volas aĉeti aŭ interŝanĝi helpmonon (Notgeld) germanan kaj aŭstrian. Interŝanĝas ankaŭ PI (bli.) sentekstajn, papermonon kaj monerojn. [1]

Ivan Stupnyĉkiĝ, instruisto, ukraina gimnazio, Dolino-aŭ-Stryj, Polujo, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun seriozaj geesperantistoj. Interŝanĝas pri geografio. Interŝanĝas ankaŭ PM, papermonon, monerojn. [1]

Mikolaj Wiremiecko, pocz. Snów, pow. Nieświezki, folw. Tareki, Polujo. Kolektantoj de il. PK en ĉiuj landoj, mi sendos belegan karton de Polujo al ĉiu, de kiuj mi ricevos belan karton. [2]

Tvera Societo Esperantista deziras korespondi kun laboristaj organizaĵoj kaj kun apartaj laboristoj ĉiuprofesaj kaj ĉiulandaj pri la problemoj de profes-sindikata movado. Adreso: Sovet-Rusio, Tver, al Esperantista Societo. [1]

D. B. Albanov en Simferopol (Rus.), Bitakska 17. Kun ĉiuj landoj. L. r. k. l. kaj volonte interŝanĝos PM. Precipe kun gejunuloj. Ĉiam respondas. [1]

Mi volas korespondi kun Finnlando, Rusujo, Estonio, Litovio, Francujo, Bulgario kaj Rumanujo, plej volonte kun fraŭlinoj. Interŝanĝas IPK, L. kaj fotografajojn. John Nilsson, Box 26-100, Bromsilla, Svedujo. [1]

Mi serĉas korespondantojn por 9 infanoj, kiuj nun partoprenas kurson. Kolektas PK, PM ktp. Por respondo mi garantias. H. Madsen, St. Giasvej 25, Odense, Danujo. [1]

Fervora samideano deziras korespondi kun Latvio, Hispanujo kaj Italujo. Respondo certe. O. Stierig, presisto, Elberfeld, Unt. Steinfeld 15 a, ĉe Schaub. [1]

Instruistino deziras ŝanĝi laboraĵojn de lernantoj, desegnaĵojn ktp. Adreso: E. Liljenquist, Bekows skola, Stockholm Svedujo. [1]

Juna gimnaziano, tre interesa pri geografaj a'eroj, estonta esplorvojaĝanto, deziras ŝanĝi karakterbildojn kaj sciigojn pri diversaj turistataj aferoj. Adreso: A. Piltz, Beskows skola, Stockholm, Svedujo. [1]

D-o V. Bruck, redaktoro de la „Institut International d' Agriculture“, Villa Umberto I, Roma, deziras konatiĝi kun ĉiulandaj gesamideanoj travojaĝantaj Roma'n. [1]

S-o Albert Lindshöm, Hanrövögen 8, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per L kaj il. PK. [1]